1-a Jaro, N-o 34

APERAS S.A.T. SEMAJNE

21. Majo 1925

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

Redaktoro: N. BARTHELMESS
Colmstrasse 1, Leipzig-Stötteritz

Gvidanto: Ekzekutiva Komisiono de SAT
23, rue Boyer, Paris XX

Administranto: R. LERCHNER
Colmstrasse 1, Leipzig-Stötteritz

La ordono de diplomataro estis plenumita

"Hindion kaj Egipton rabas la anglaj imperiistoj; la milionoj da laboruloj de Tunizio, Maroko, Senegalo, Sudano kaj Kongo mortadas sub la premo de la franca kapitalistaro; la loĝantoj de Java-insulo estas sklavoj de la nederlanda burĝaro, sed *ĉiuj imperiistoj*: la anglaj, la francaj, la usonaj, la italaj, la germanaj, deziras regi nian landon, volas sklavigi nin, kaj niajn infanojn . . ."

Ĉi vortojn diris en 1916-j. la patro de la ĉinia revolucio, la gvidanto de la rabata ĉina popolo — Sun-Jat-Sen. Kaj ĉi-vortoj estas tute veraj. La seninterrompaj, senfortigaj internaj militoj, la neesprimebla mizero de milionaj masoj de la ĉina popolo, la teruraj epidemioj, la mortado de dek- kaj centmiloj da homoj, la elmigrado de ĉinoj al najbaraj landoj, la amasaj mortigoj de ĵusnaskitaj infanoj — ĉion-ĉi kaŭzis la eŭropa kaj usona kapitalistaro, por kiu gravas, ke Ĉinio ne estu forta kaj memstara ŝtato, kiun oni ne povus rabi senpune kaj senfine. Kaj necesas diri, ke la *memstara ĉinia ŝtato ne ekzistas,* ke ĉiuj estraraj fakoj de Ĉinio, kiel ajn oni ilin nomu, *dependas* de l' reprezentantoj de Anglio, Usono, Francio, Italio k. a., kiuj loĝas en la, tiel nomata, diplomata kvartalo de Pekino, el kie ili diktas sian volon.

Trans la limon de la diplomata kvartalo *neniu ĉina laboristo, kamparano, aŭ soldato rajtas paŝi.* Tiu el ili, kiu kuraĝas malobei ~~la ekzis~~tantan ordonon, estas plej terure batpunata.

En ĉi-loko, en la eŭropa diplomata kvartalo, al la eŭropaj komercistoj, spekulistoj, al la ĉiu-specaj burĝaj aventuristoj, oni donas mandatojn, por ĉiu-maniera rabado kaj perforto super milionoj da ĉinia laborularo.

Ĉi-tien, en la diplomatan kvartalon, alveturas ĉiniaj estroj por aŭskulti ordonojn de la ĉio-pova diplomataro, kaj ĉi-tien oni invitas ĉiniajn generalojn, al kiuj oni donas monon por daŭrigi la intercivitanan militon.

Oni povus montri milojn da faktoj, atestantaj, ke la sorton de Ĉinio kaj la vivon de ĉinia laborularo regas la ambasadoroj de la imperiistaj landoj. Sed por tio oni bezonas eĉ ne unu libron, kaj tial ĉi-tie ni rakontos nur unu fakton: pri tio, kiel antaŭ nelonge, laŭ ordono de la diplomata korpuso, estis

Mortpafitaj 800 soldatoj.

Tagon post tago oni rabas Ĉinion. La civitanaj militoj, komencataj laŭ la volo de l' eŭropa kaj usona burĝaro, frapas ĉiam pli kaj pli la mastrumadon de l' lando. Ĉinio estas ŝtato de mizeruloj. Malgraŭ tio la registaro devas havi grandan konstantan armeon. La soldatoj ricevas de la registaro tute etan salajron, kaj ankaŭ po eta porcio da rizo ĉiutage.

Sed depost septembro 1924, la ĉinia registaro tute ne povis pagi al la soldatoj, eĉ po 7 spesdekoj (ĉirkaŭ 7 kop. laŭ rusa valuto), kaj ĉe la fino de la jaro oni ĉesigis doni eĉ iliajn rizajn porciojn. Nur la oficiroj ricevadis salajron kaj nutraĵon.

Malgraŭ tio, sub minaco de karceroj kaj mortpafoj, oni postulis de l' soldatoj, ke ili partoprenu ĉiujn militokupojn, gardservu, kaj plenumu la tutan soldatlaboron.

En la kazernoj komenciĝis malsanoj. Sur pedikplenaj, malkovritaj bretoj kuŝis la skorbutmalsanaj soldatoj.

La plendoj kaj petoj de la soldatoj ne helpis.

La sepan tagon, la malsatiĝintaj, ekscititaj soldatoj eliris el la kazernoj kaj venis bazaron. Tie ili sin turnis al nutraĵ-vendistoj kun la jena peto:

— Ni servas al vi, sed jam la sepan tagon oni ne donas por ni la nutraĵon. Do helpu. . . .

Responde, la vendistoj komencis fermi siajn butikojn kaj vendotendojn, kaj la eŭropaj komercistoj ekkuris la diplomatan kvartalon.

Tiam la soldatoj komencis la rekvizadon de pano, viando, rizo . . . La multaj, ne forirante de la butikoj, komencis ŝiri per dentoj viandon, kaj manĝi ne kuiritan rizon.

Post duonhoro en la bazaro aperis la oficiroj, enĉefe kun komandanto de unu el la regimentoj. La komandanto kunvokis la soldatojn, kaj deklaris, ke se oni tuj revenos la kazernojn, neniu el ili estos punita, kaj krome la komandanto promesis renovigi depost la sekvanta tago la disdonadon de nutraĵporcioj.

Ĉirkaŭ 1000 soldatoj, fidante al la komandanto, revenis la kazernojn. Tie ilin tuj oni senarmigis kaj enkatenigis.

Dum la sama tempo en la Usona ambasadorejo okazis la kunsido de la diplomata korpuso. Pri kio do interkonsiliĝis kaj

kion decidis la diplomatoj?

Ili decidis mortpafi ĉiujn ĉinajn soldatojn partoprenintajn la rekvizadon, ĉar "pro ili" "malprofitis" la eŭropaj komercistoj.

Kaj dum ĉi-nokto ĉirkaŭ 1000 soldatojn oni metis en ŝarĝvagonojn; parto el ili sufokiĝis pro nekredebla malvasteco en la vagonoj (kiuj estis plenfermitaj), kaj

ĉirkaŭ 800 soldatoj estis mortpafitaj en urbo Kalgan, kuŝanta 110 mejlojn de Pekino.

La ordono de la diplomataro estis plenumita . . .

* * *

Por la ĉinaj laboruloj ne ekzistas pli malamataj vortoj ol la "diplomata korpuso", "la diplomata kvartalo", aŭ "la eŭropa Pekino".

Sed tiel nur estis. Nun tio-ĉi iome ŝanĝiĝis. Kvankam la ĉina popolo, kiel antaŭe, malamas la diplomatan kvartalon, tamen tie, en ĉi-kvartalo, estas anguleto, kiu flame esperigas la milionojn da koroj, pri kiu kun ega amo pensas rabataj kaj turmentataj amasoj de la ĉina popolo.

Tie, en ĉi-anguleto, flirtas la ruĝa flago.

Tie estas la ambasadorejo de Unio de Sovetaj Socialistaj Respublikoj, sola kaj potenca amiko de ĉiuj sklavigitaj popoloj.

El gaz. "Transbajkala laboristo" trad. *K. Fade.*

NOVAĴOJ EL BRITIO

Homafiŝoj

Komencas ribeli eĉ tiuj subpremitaj homoj kiuj portas reklamilojn. Tia laboro antaŭlonge postulis nur, ke la laboristoj portu du tabulojn, unu antaŭe kaj la alian malantaŭe; sed nun ĉiam pli peza iĝas la laboro. Oni vidas, krom la du tabuloj, aliajn tabulojn super la kapo tenitajn ĉe tiu pozicio per fortaj stangoj; kaj nokte la malfeliĉaj portantoj devas montri ankaŭ lumaĵojn, por ke la strat-marŝantoj ne maltrafu iujn vortojn sur la afiŝoj. Sed . . . ne sufiĉis la ekspluatado kontraŭ la portantoj . . . ili devis nevole partopreni filmfotojn ricevante nenian pagon el la profito kiun faris la entreprenistoj per la fotoj. Do, finfine, "turnis sin la vermoj". Ili antaŭnelonge sin organizis en Meti-Sindikato por pli bone batali kontraŭ la ekspluatantoj. Lastan fojon, kiam mi faris demandojn ĉe la oficejo kie lokas la Sindikato, oni sciigis min, ke la laboristoj postulis gravan altigon de salajroj kaj atendas respondon post tri semajnoj.

Post Francio — Britio

Ĉu niaj Knab-Portistoj de la Eastern Telegraph Company (Orienta Telegrafa Kompanio) legis pri la sukceso de la francaj knaboj de sama metio? Iel ajn, ili strikis la 14. aprilo, demandante pliigon de salajro po 10 /— en semajno kaj plirangiĝon anstataŭ kiel nun senelireja deĵoro. La striko finiĝis la 21. aprilo: kvankam la strikantoj ne ricevas tujan altigon de salajro, la kompanio pripensos la tutan demandon pri dungado de komisiistoj cele de aliigo de kondiĉoj, speciale pri nedungado de knaboj pli ol 17 jaraĝaj kaj pri pli facila oportuno por ricevi post kelkaj jaroj endomajn oficojn.

Senlaboruloj

La nombro de personoj registritaj kiel ne-dungitaj je aprilo 13., estis 1,204,800; t. e. 38 447 pli ol en antaŭa semajno, kaj 165, 613 pli ol antaŭ 1 jaro. Sed Profesoro Hewins (Hjuins), en memorandumo por *Empire Development Union* (Unuiĝo por Disvolviĝo de l'Imperio) diras, ke la oficiala cifero tute ne estas mezurilo taŭga, ke ĝi reprezentas malpli ol duonon de la personoj kiuj ricevas ŝtatan subvencion; ke ĉi-tiu stato de senlaboreco daŭros, kaj ke ni neniam plue regajnos superecon kiel industria lando. Jen senkaŝa eldiro de konservativulo.

Profit-Partoprenantoj

"Kavaliro" Alfred Mond, Liberalulo en nuna Parlamento, bezonas leĝon kiu devigas industriajn entrepenistojn „dividi" kun laboristoj la profitojn de la entrepreno. Li ne sugestas per kia proporcio tio okazus, sed ni povas iom diveni tion, legante la ciferojn en Raporto Jara de Lever, Fratoj. La bilanco je kredito de profit- kaj perdo-konto estas £ 5 476 166. El tio, £ 250 000 estas transdonataj en rezerv-kazon, £ 55 312 iĝas bilanco por proksima jaro, kaj, el la £ 4 951 266 kiuj restas, la granda aro de laboristoj ricevas £ 219 588, malpli ol 22 onon de la tuta sumo, kaj la restaĵon prenas ne-laborintaj akciuloj. La lerta "Kavaliro" opinias, ke grand-skala profit-dividado haltigus la "Ruĝan Danĝeron;" sed ĉu li ne forgesas, ke la malbonegaj ruĝuloj postulas, ke la laboristoj ricevu la *tutan* rezulton de sia laboro?

Milito kaj Paco

S.-ro Charles Higham (Ĉarls Hajam) parolante ĉe Reklamado-Klubo, plendis, ke la mondo peliĝas al alia milito, ke la kulpo estas sur flanko de la registaroj kiuj uzas la talentojn de reklamistaj geviroj por celo de milito, sed ne volas uzi tiujn samajn ecojn por helpi daŭrigi pacon. Tamen, ĉu la kaŭzo ne estas ĉar la popoloj ne deziras militon, do, la registaroj devas uzi ĉiujn rimedojn por popularigi ĝin? En *Daily Herald* proksime de tiu eldiro de S.-ro C. Higham, mi legis, ke la farmistoj de Saskaĉeŭan (Kanado) senpacienciĝas pri la registaro de Otava, kiu estas sub influo de la fervojistaj kompanioj kiuj kunpremas la farmistojn en gorĝo. La farmistoj devas forsendi sian tritikon per la haveno St. Lawrence (Sent Loranc) anstataŭ per tiu de Port Nelson, ĉar la Kolonia registaro rifuzas kompletigi la Fervojon Hudson Bay (Hadsan Be). Dum milito, kiam temis ĉefe pri tuja havigo al Britio de tritiko, oni komencis febre konstrui la fervojon kaj havenon, elspezis tiucele 20 000 000 dolarojn, kaj kompletigis la fervojon krom la lastaj 90 mejloj al haveno: tiam okazis militĉesigo kaj ankaŭ ĉesigo de laboro ĉe la vervojo; do, tiuj 90 mejloj de ne-farita fervojo baras la mallongan vojon al la tritik-sendantoj, kiuj devas sendi ĝin laŭ 2000 mejloj antaŭ ol ĝi atingas la maron. Eble post la proksima milito la farmistoj ricevos la necesan helpon!

Laŭleĝa ribelo

Vojaĝintoj per Londona Subtera Fervojaro hieraŭ rimarkis, ke okazis granda malfrueco de la vagonaroj, kiu pliiĝis en la lastaj horoj de la tago. La kaŭzo estas, ke la kompanio elprenis 150 gardistojn, do, ties kamaradoj, por protesti, laboras rigore laŭ leĝaro postulita de la kompanioj kaj Ministro de Industrio. Teorie, la leĝoj devus esti obeataj, sed la laboristoj kiuj pli bone konas kondiĉojn ol tiuj kiuj sidas en oficejoj, neniam atentis la regulojn, obeo al kiuj necesigus multe pli da laborantoj en la fervojo. Ankaŭ eble ni vidos subitan respekton por leĝoj ĉe la Granda Okcidenta Fervojo de Anglio, ĉar ties kompanio minacas pri forsendo de fervojistoj, kaj jam kelkiuj el ili sugestas kiel rimedon Laboron laŭ reguloj, ĉar tio necesigus eĉ *pli* da laboristoj anstataŭ malpli. E. K. L.

La enmigrado en Francio

Jam antaŭ 1924 estis en Francio pluraj milionoj da eksterlandaj laboristoj, plejparte dungitaj de la milito.

La jaro 1924 alportis al ni novan eksterlandan laboristaron. Jen la oficialaj nombroj:

Belgoj	34 714
Hispanoj	14 982
Italoj	97 577
Portugaloj	14 206
Poloj	38 048
Ĉekoslovakoj . . .	10 090
Rusoj	4 139
Alilandanoj	25 609
Sume	239 365

Tiuj nombroj temas nur pri la laboristoj registritaj ĉe la policoficejoj. Preskaŭ sama kvanto estas neregistrita.

Nia sennacieca spirito malebligus malbenon de tiu enmigrado, se ĝi ne estus frukto de kapitalisma varbado. Ĉar la enlandanoj ekvidas sian sklavecon kaj minacas kontraŭstari la subpremon, la mastroj dungas eksterlandanojn, per allogaj promesoj, por unue malplialtigi la salajrojn, kaj due nuligi la efikojn de enlanda movado, eĉ kontraŭbatali ĝin. Mi laste sciis de Adriatikulo, ke en Jugoslavio fivarbistoj promesas al laboristoj salajrojn de 40 ĝis 60 frankoj potage, en Francio! Pura mensogo, ĉar tie tre malmulte da tre lertaj laboristoj ricevas pli ol 30 frankojn, pli ol duono de la franca laboristaro ricevas malpli ol 20 frankojn, iuj en kamparaj urbetoj kelkfoje devas vivi per 8—10 frankoj potage!

Allogitaj per tiaj promesoj, multaj alilandanoj forlasas sian landon por iri al riĉeco en Francio. Sed tuj post sia alveno, ili ekspertas la trompadon. Anstataŭ 40 frankoj, ili plejofte ricevas 14—16, eĉ 18 frankojn, kies plejparton ili lasas al la mastro, kiel pago ĉu de dormejo, ĉu de manĝaĵoj, ĉar la mastroj havas por ili dormejon kaj kooperativon. — La dormejo similas tiun de militkaptitoj, t. e. ligna barako, kie ili devas dormi 50—60-ope, sur aĉaj litoj, kaj la nutraĵoj ne pli valoras ol tiu de soldatoj dum milito. Plie, la eksterlandanoj nenion rajtas civite, ili estas kvazaŭ dombestoj. Ili estas zorge spionataj

de aparta polica fako, kaj se iu el ili ŝajnas revoluciema, eĉ ete, li tuj estas forpelita, sen ia atento pri lia familio aŭ monstato. Okaze de komunista persekutado, antaŭ du monatoj, pli ol 200 eksterlandanoj estis tuj forpelitaj, kaj ĉe la landlimo liveritaj al sialandaj ĝendarmoj. Komencis tie persekutado kaj turmentado. — Sed faŝistojn oni ne forpelas! — — —

Konsekvence, alilandaj kamaradoj, alveturu Francion nur se vi kapablas laŭvole labori kaj vivi, neniam akceptu la mensogajn proponojn de tiuj varbistoj, aliel vi baldaŭ bedaŭrus vian troan kredemon: anstataŭ feliĉon, vi nur spertus mizeron, eĉ persekutadon se vi ne estas silentemaj. Sklaveco estis leĝe malpermesita, sed fakte ĝi ankoraŭ daŭras, kaj oni povas vidi, en burĝaj gazetoj anoncojn por "laborkarno". — Atentu, kaj ne estu viktimoj de tiuj fiuloj! *Edo — 883.*

Kiel ornamas germana revolucia proletario siajn loĝejojn[1])

De Landova-Stichova

Loĝejoj de l' germana revolucia proletario estas malriĉaj, malgrandaj, — ĉu en subtegmento aŭ kel-etaĝo. La proverba pureco kaj ordemeco de l' germanaj hejmmastrinoj donas al tiuj malriĉaj hejmoj tiun agrablan ĉarmon de l' familia nesto kiu en memoro varmigas ĝis malfrua aĝo, se ne estas tiu ĉi nesto tro pleñigita kaj venigita en ĉiaman mizeron. Ĝojige min surprizis nekompromisema revolucia ornamado de l' plej granda parto el tiuj hejmoj kie mi dum tempo de mia migrado estis gasto. Lenin, Luxemburg, Liebknecht mankas nenie, iliaj bildoj en diversaj formoj estas ĉirkaŭplektitaj per dornaj rondgirlandoj, alie per floroj aŭ funebra krepo. Mantukoj kaj diversaj kovraĵoj, ankaŭ kurtenoj estas brodltaj per ruĝaj steloj kaj sovetaj insignoj. Ĉe unu k-dino mi vidis sub vazarujo alpendigita bele kaŭterizitan teleron kun devizo "Heil Moskau" kaj alie en hejmo de teksisto tablotukon sur tablo kun enteksitaj revoluciaj devizoj. Ili diris al mi ke tiun ĉi tablotukon la patro teksis mem kaj ke oni ĝin nur metas sur tablon dum festotagoj. El tiuj hejmoj oni ne nur elĵetis burĝan stilon kaj sanktajn bildojn, la vereco kaj profunda revolucia konvinko estas dokumentita ankaŭ en la elekto de l' libroj. Tiuj estas la konsolo, fiero kaj la fonto de l' persista revolucia volo, la karaktero de l' k-doj kaj k-dinoj. Bibliotekon, ĉu el bretoj memfaritan aŭ akiritan per depagoj aŭ hazarde malmultekoste aĉetitan, ĉiu posedas, kaj se venas severa tempo de l' mizero kaj oni vendas iom post iom kiel eble ĉion, la biblioteko estas ĝis la lasta tempo ŝirmata kaj devas esti tute malesperiga stato, se devigas al vendo de l' libroj kaj fine de biblioteko. Sed tio estas jam vere malĝojiga supro de l' mizero, — kaj se rakontas k-dinoj pri tiaj tempoj, larmiĝas la okuloj ne nur al ili ankaŭ al tiuj kiuj aŭskultas tian historion, ĝi estas ĉefe egala-griza laciga kaj povas malpacigi kaj malĝojigi nur koron home senteman, al batalo entuziasmigi nur tiun kiu havas sanan kapablon pri rajto kaj justeco. Kaj tiel denove kaj denove meze de germanaj k-dinoj mi volas laŭtege ekkrii en la tutan per naciismo fanatikigitan mondon: Faru distingojn! Ne intermiksu honestan revolucian germanan proletarion kun kapitalista kaj imperialista bando kiun havas ĉiu nacio; vi ne devas plu starigi nacion kontraŭ nacion, sed klason kontraŭ klason, tio estas laborantan kontraŭ ekspluatantan klason! Kaj tiel sur vojo tra revoluciteritorio en Germanio firmigis mi mian malnovan firman konvinkon ke socialismo kaj malebligo de l' milito efektiviĝos. Sed ni devos subteni proletarion de l' "malamika" nacio, oni devos unu la alian ekkoni kaj frate doni la manon, kaj oni devas stari fundamente kaj nekompromiseme ankaŭ en la bagatelaĵoj de l' ĉiutaga vivo, kiel mi vidis en malriĉaj hejmoj de l' germana klaskonscia revolucia proletario.

Laŭ ĉeĥa gazeto "Socialista" trad. G. L. (696).

1) Tiu ĉi priskribo de konata ĉeĥa socialistino povos elvoki malĝustan bildon ĉe kelkiuj. Ŝajnas, kvazaŭ la belaj brilaj koloroj de l' ruĝaj ornamaĵoj "subaĉetis" la animon de l' k-dino, tiamaniere ke ŝi nur sciis pentri al ni la luman flankon de l' medalo. Tamen la multajn ombrajn flankojn, la grandan negativon, donantan la akran kontraston, ni nepre ne devas perdi el okuloj, legante tiun ĉi "ruĝ-orname" dekoritan skizon. Aliel tutcerte formiĝus malĝusta impreso. Red.

Kiel prezentiĝas municipaj balotoj en Francio

Kvankam en Francio municipaj konsilantaroj havas nur tre malgrandan prerogativon, municipaj balotoj kiuj okazis la 3. majo, prezentas gravan okazintaĵon ĉar ili pro la nunaj krizaj cirkonstancoj altiĝas ĝis alteco de politika signifo.

Jam de kelkaj semajnoj ĉefministro Herriot troviĝanta antaŭ la abismo de la franca ŝtata ŝuldo, komprenis ke nur depreno el kapitalo permesus kelktempe daŭrigi la vivon de la putriĝanta reĝimo; sed franca burĝaro ne konsentis solvon pere de demokrata rimedo, ĝi ŝajnas alpreni kiel maksimo "Ĉion aŭ nenion"; ĉe la senato ĝi faligis ministraron. Plimulto de la Parlamento, kiu sekvis al Herriot, sekvas nun al Painlevé, alia demokrata parlamentano, kvankam tiu-ĉi forĵetis deprenon el kapitalo. Spite alestado de la lerta financisto Caillaux ĉe ministrejo de financoj, financa situacio de l' franca ŝtato povas nur pligraviĝi: ĉu Caillaux mem baldaŭ ekvidos kiel nura rimedo deprenon el kapitalo, kaj tiam burĝaro lin faligos, — ĉu li ankoraŭ pli multe postulos el laboristaro, kaj tiam laborista klaso ekribelos: Tia estas la dilemo, el kiu dekstra aŭ maldekstra registaro neniel povas eliri.

Akra batalado okazis; afiŝoj, flugfolioj, ĵurnaloj, konferencoj, eĉ revolverpafadoj senĉese sinsekvis. Eĉ malgrandaj urbetoj kie ĝis nun ekzistis nur unu aŭ du burĝaj listoj da kandidatoj, havis ĉi-foje kvar, eĉ kvin listojn, inter kiuj liston de revoluciuloj. Jam hodiaŭ[1]) ni povas diri ke revolucia periodo tute ne estas finita.

Robert Soudant.

Batalo inter komunistoj kaj faŝistoj en Parizo

La 23. aprilo, la sango fluis en Parizo, okaze de privoĉdonada kunveno. La kunveno estis sufiĉe trankvila, sed post la eliro, faŝista trupo parade marŝis sur la strato provokanta kaj armita per bastonoj. Kolizio okazis kun laborista aro kaj 4 faŝistoj estis mortigitaj — 2 komunistojn oni arestis. Ni devas diri ke antaŭ la kunveno la ĉambro estis jam okupata de proksimume 300 faŝistoj armitaj per bastonoj kaj kielmilite organizitaj per batalionoj kaj obeantaj je ordonoj de siaj ĉefoj, kvazaŭ ili estus soldatoj. Tiu agmaniero tre kolerigis la lab. ĉeestantojn, kaj oni ne devas miri ke batalo okazis.

Cetere la mortigitaj faŝistoj ne ĉeestis la kunvenon, sed ili venis el alia faŝista kunveno okazinta ĉe la alia flanko de Parizo. Ĝis nun, la burĝa gazetaro, kaj la faŝistoj diris ke tiuj iliaj anoj estis alvokitaj per telefono, kaj ili kvazaŭ asertas ke la komunistoj mem alvokis la faŝistojn de la alia kunveno por ilin altiri en mortembuskon. La komunistoj tion neas vigle. La faŝistoj asertas ankaŭ, ke siaj anoj estis nearmitaj; tamen "L'Humanité" publikigis fotografaĵon de armiloj kaptitaj ĉe la faŝistoj mem dum la batalado. La afero do ŝajnas klara: la popolo estis provokata kaj sin defendis[2]). *Ru 835*

TRA LA KLASBATALO

11. majo la nova prezidanto de Germanio, Hindenburg, eniris Berlinon, bone ŝirmata de policaj regimentoj. La komunistoj faris kontraŭdemonstraciojn.

En kelkaj regionoj de Ĉinio regas malsatmortado pro manko de provizoj.

En Hamburg enkarcerigitaj polit. kaptitoj (el Oktobra ribelo) komencis malsatstrikon denovan pro malbona traktado.

En Bulgario la t. n. iniciatoroj de l' eksplodo en la katedralo de Sofio estas mortkondamnitaj. (Parto el ili ne ĉeestas.)

La postbalotoj en Francio por la municipaloj plifirmigis la superecon de la maldekstraj respublikanaj partioj. Komunistoj ankaŭ gajnis mandatojn.

1) skribita antaŭ la baloto. — Red.

2) Diskutado okazis pri tio ĉe la parlamento. Oni traserĉis la loĝejojn de kelkaj komgvidantoj.

VARBU NOVAJN ABONANTOJN!

Nova germana imperialismo

La 26. aprilo, okazis la 2. balotiro pro la elekto de la regna prezidanto. Montriĝis jena rezultato:

1. Hindenburg (kandidato de regna bloko) 14 639 000 voĉoj
2. Marx (kandidato de popola bloko) 13 753 000 voĉoj
3. Thälmann (kandidato de kompartio) 1 932 000 voĉoj.

Kion diras al ni ĉi tiuj ciferoj? La elekto de Hindenburg kiel prezidanto de la germana respubliko evidente montras



al la proletaro la monarkistan danĝeron, la feran volon de la kapitalistoj, per ĉiuj rimedoj malebligi la disfalon de ilia putriĝinta sociordo. Hindenburg, la amasbuĉisto de la mondmilito, la nuntempe laŭdata "Savanto" (resp. Savonto), pro la akcepto de la ofico signifas la diktaturon de la peza industrio kontraŭ laboristaro kaj la pruvon por emo al novaj imperialistaj aventuroj eksteren.

Ekestiĝas la danĝero, ke la nova imperialismo aktive partoprenos je la militplanoj de la iamaj "malamikoj" atakonte Sovetion. Tiel statas nuntempe la situacio en Germanio, kaŭzita per la indulgemo de la laboristaro, kiu hezitis preni la tutan potencon ekonomian kaj politikan dum novembro 1918. La 9. novembro 1918 ili batalis kontraŭ Hindenburg kaj burĝaro, hodiaŭ la 26. aprilo tiuj revenas, renoviginte sian potencon per longjaraj sangbataloj kontraŭ la laboristoj.

Sur la kampo de la longjara koalicipolitiko ili sukcesis. Esperu ni, ke la laboristoj lernos el tiu evoluo, ke poten-

VIVKOŜTOJ EN POLIO

Sube presita preztabeleto montras la vivnecesaĵajn prezojn en julio 1924, kiam estis enkondukita nova pola valuto (zlotoj), kaj la nuntempajn kompare.

Por montri, kiel longe oni devas labori por ĉiu nutraĵo ktp., mi fiksis la mezan tagsalajron je 4,80 zlotoj. Ĉi-cifero estas eble iom pli granda ol la fakta mezsalajro, ĉar kvankam estas opaj laboruloj salajrataj je 10—15 zlotoj, tamen la plimulto de la kvalifikitaj laboristoj perlaboras de 5—7 zlotoj, la nekvalifikitaj de 2,50—4 zlotoj.

La donitaj ciferoj estas precizaj kaj koncernas la orientan Malgrandpolion (iam: Orienta Galicio).

Estas rimarkinde, ke la 1-an de majo estas plialtigita la fervoja tarifo je 25 proc. ĝis 30 proc. Post ĉi-signo de la "sanigo financa" en Polio estos atendenda plua plikariĝo de ĉiuj vivnecesaĵoj.

PREZTABELETO

Speco	Prezoj en zlot.				perlaborante 4,8 zl. potage oni devas labori			
	unuo	Julio 1924	Aprilo 1925	pli-aŭ malaltiĝo en proc.	semajnojn	tagojn	horojn	minutojn
blanka pano	1 kg.	0.50	0.60	+ 20			1	—
tritika faruno	„	0.55	0.75	+ 36			1	15
terpomoj	„	0.08	0.10	+ 25			—	10
bovaĵo	„	2.00	1.50	— 25			2	30
porkaĵo	„	2.40	1.80	— 25			3	—
kolbaso	„	3.60	3.00	— 20			5	—
porklardo	„	2.60	1.90	— 27			3	10
fazeoloj	„	0.50	0.45	— 10			—	45
rizo	„	0.65	0.90	+ 38			1	30
butero	„	4.50	6.40	+ 44			2	40
marmelado	„	1.60	1.80	+ 13			3	—
sukero	„	1.10	1.20	+ 9			2	—
kafo	„	4.00	6.00	+ 50		1	2	—
teo	„	16.00	16.00	—		3	2	40
salo	„	0.28	0.35	+ 25			—	35
ovo	1 p.	0.08	0.08	—			—	8
brulligno	100 kg	3.20	4.00	+ 25			6	40
petrolo	1 l	0.27	0.32	+ 19			—	32
flava sapo	1 kg	1.20	1.60	+ 33			2	40
biero	1 l	0.72	0.80	+ 11			1	20
karbo	100 kg		6.00			1	2	—
cigaredoj (mezkvalitaj)	10 p.		0.30—0.50				—	30—50
1 gazeto	—		0.15				—	15
leterafranko enlanda	1		0.15				—	15
„ eksterl.	1		0.30				—	30
1 tramveturo	—		0.20				—	20
fervoja veturo	po 10 km		0.40				—	40
loĝejluo (1—3 ĉambroj)	pomonate		20—40.00			4 ĝis 8	1 2	20 40
virvestaĵo ordinara, konfekcia	1		80—100		2 ĝis 3	4 2	5 6	20 40
virvestaĵo, bona, laŭ mezuro	1		180		6	1	4	—
viraj ŝuoj, bonaj bovidledaj	1 paro		28			5	6	40

Kortegano.

con ili nur povas akiri per *klasbatalo,* neniam per voĉdoniloj, kaj principe neante ĉiun ajn koalicion bun burĝoj. Oni ne nutru serpenton ĉe propra mamo. *Voko.*

"Mizero de la laboristaro en Rusio"

La presservo de la Internacia Laborista Asocio ("Berlina Internacio" anarĥo-sindikatista), kies kongreso okazis en Amsterdamo kaj diskutis interalie la problemon pri la mondlingvo, en N-ro 4 de sia esperantlingva bulteno enhavas inter diversaj informoj artikoletojn pri "mizero de la laboristaro en Rusio."

La artikoleto rakontas, laŭ materialo ĉerpita el la *ĉefa rusa sindikatarorgano* "Trud" (Laboro), pri malbona stato de laboristoj en kelkaj lokoj de Rusio — Ivanovo-Voznesensk, Vjaznikovo (Vladimir-gubernio) kaj Makejevka (Donec-regiono). Tie — jen mankas lavovazoj, sapo, ventumado, manĝoĉambro aŭ vestoŝrankoj en katunfabrikoj; jen en teksfabrikoj estas tro multa vaporo tiel, ke la malsekaj transmisiaj rimenoj ofte glitas de la radoj kaj estas disŝirataj la ŝtofoj; jen iuloke forestas eĉ unu malsanulejo tiel, ke la malsanuloj devas esti transportataj en la 17 ĝis 20 kilometrojn malproksiman urbon kaj ofte ili devas restadi en la plej malsanigaj malpuraj kondiĉoj; jen estas terura spacomanko, ofte ne ekzistas fornoj por kuiri la manĝaĵon, kiu estas donata en naŭza medio tiel, ke tiu, kiu ne kunportis propran ujon, li simple lasas verŝi la kaĉon en la ĉapon aŭ laborkitelon (!) ...

El tiu ĉi materialo la bulteno de I. L. A. faras konkludon, ke la fanfaronado pri la komunisma paradizo por la laboristoj en

Rusio estas mensogo, kontraŭe — ĝi estas por ili infero, kvankam Eldorado (orlando) por la kapitalistoj de ĉiuj landoj (?!)

Ni neniel volas refuti la suprecititajn faktojn, pri kiuj la ĉeforgano de la rusaj sindikatoj mem plendas kaj anoncas; tio estas *absoluta vero*, ke en multaj lokoj, eĉ ĉie en Sovet-Rusio tre ofte oni povas observi la plej negativajn okazojn. Sed fari konkludon, similan al la supra, oni povus nur, se tio estus *rezultaĵo* de la mastrumado komunista, kaj ne *objektivaj cirkonstancoj* de tiu mastrumado.

Oni forgesas, ke antaŭ la revolucio Rusio estis unu el la *plej postrestintaj, malplej kulturaj* inter la Eŭropaj landoj. Ĝi estis lando duonazia, duonbarbara, longatempe administrata de malsaĝa absolutisma carregistaro; kaj post ties forigo kaj post plurjara imperimilita kaj revolucibatala ĥaoso la tuta nekomparebla antaŭa malkulturo kaj malordo restis kiel *malbenita heredaĵo de la malnova mondo* por la nova generacio, kreanta estontan pli bonan vivon.

Oni forgesas, ke la laborista registaro sur ĉiu centimetro de sia vojo al la reorganizo de la tuta socio, al la konstruado de la nova ordo renkontas amasegojn da embarasoj pure teknikaj, t. e. devenantaj *nure el la malnova malkultureco kaj mizereco de la popolo*. Plene evidentas, ke la sistemo de la sovetadministrado neniel povas esti konsiderata tie ĉi kiel kulpo pri tio, kio efektive estas ne-pardonebla kulpo de la malnova antaŭrevolucia reĝimo.

Kontraŭe — oni povas per faktoj pruvi, ke nome nur la sovetsistemo, nur la laboristar-registaro ĉiel ebligas, helpas, akcelas, zorgas, penas, ke la vivo de la laboristoj estu pli kaj pli bonigata (kiom tio estas ebla inter la objektivaj cirkonstancoj).

Estas ridinde diri, ke en teknike mizera lando la laboristoj vivu en pompa perfekta komforto. Certe ne — eĉ en ideala komunismo. La komunismo (en malvasta koncepto) starigas nur *socian* justecon, ne pli, kvankam verdire ĝi ankaŭ efektivigas novajn perspektivojn por la *materia* bonstato.

Ekzemple, oni povas citi jenan rimarkindan fakton.

En la sama Ivanovo-Voznesensk, grava industria punkto de Rusio, — kies malbonaĵoj estis notitaj en la bulteno de I. L. A., — ĵus (la 29-an de marto) okazis solena inaŭguro de la *unua en Rusio* pro sia giganta amplekso *laborista fabrikkuirejo*. Ĝi estas por Rusio afero, kiun oni neniel povis imagi antaŭe. Muntita laŭ la plej lastaj inventoj de la tekniko, funkcianta per elektro kaj vaporo, kun meĥanikaj laboriloj, kun multaj filiojmanĝejoj en la tuta urbo (provizataj per akurataj termos-kaldronoj, kiuj plene konservas la temperaturon de la nutraĵo), en perfekta pureco, bone provizita — kiom tiu fabrikkuirejo estas malproksima de la kutima por la malnova Rusio kaĉo en ĉapo!

Ne estas fanfarono la konigo de tiu ĉi fakto. Ĝi nur montras unu malgrandan detalon el tiu grandioza batalo kontraŭ la malnova mizero, kontraŭ la antaŭa malordo, kontraŭ la ĉiama mallumo, ankoraŭ restantaj herede ĝis nun, — el tiu grandioza batalo kaj laboro, kiu nun estas efektivigata en la „komunista“ Rusio.

N. Vladimiroviĉ.



DIVERSAĴOJ

PRI SCIENCISTOJ KAJ INTELIGENTULOJ EN SOVETIO, PRI PARTISTATUTO DE BOLŜEVIKOJ KAJ PRI NIA VIDPUNKTO AL LINGVAJ PROBLEMOJ

Mi utiligas proteston de pacemaj redaktoroj de kazanja "Esperanto hejme„ (kontraŭ mia prilingva artikolo en n-o 14a de Sennaciulo) por rakonti al Satpubliko pri titolita temo kaj tiel ĝustigi opinion pri celoj de niaj lingvaj studoj.

Scienco kaj sciencistoj en Sovetio estas ĉiel akcelataj kaj subtenataj, se ili servas estanton de Sovetio, ne estinton. En Leningrad ili loĝas en palacoj de estinta caro. En mia Irkutsk (geografia mezo de Azio) Universitato kaj loĝejoj de profesoroj lokiĝas en plej bonaj domoj de l' urbo (palaco de estinta guberniestro princo). Rektoro de nia universitato estas ĉiama ano de supera gubernia estrarejo. Diversspecaj specialistoj en Sovetio estas distinge salajrataj. Do scienco kaj sciencistoj estas bone flegataj en Sovetio, laŭ la rimedoj, kiuj tamen (post milito kaj granda Revolucio) ne povas esti luksaj kompreneble. Kiel rilatas bolŝevikoj (komunistoj) al tiel nomataj "inteligentuloj"?

Jen kion tekstas pri ĉi- temo § 7 de partistatuto de bolŝevikoj:

Antaŭ fariĝi membro de RKP estas provataj

1) *laboristoj kaj ruĝarmeanoj* (devenintaj de laboristoj kaj de vilaĝanoj) dum *6 monatoj*, 2) *vilaĝanoj kaj metiistoj dum unu jaro*, 3) *ceteraj (do oficistoj, tiel nomataj inteligentuloj ktp.) dum du jaroj*.

La lasta kategorio *(do inteligentuloj)* krom tio bezonas 5 rekomendantojn, kiuj devas esti membroj de l' partio ne malpli ol dum kvin jaroj ĉiu.

La du unuaj kategorioj (laboristoj, vilaĝanoj, metiistoj) bezonas nur *tri* rekomendantojn, kiuj devas esti partianoj ne malpli ol dum tri jaroj.

Do inteligentuloj, oficistoj ktp. ne ĝuas konfidon de l' partio. Oni povas figurmaniere diri, ke bolŝevikoj "pelas" ilin de partio (sed ne el partio ĉar partio sen inteligentuloj taŭgas por nenio).

Vi vidas, ke la samaj homoj, kiuj metis siajn sciencistojn en carajn palacojn, estas tre suspektemaj rilate al ĉiuj inteligentuloj Kial? Nur tial, ke inteligentuloj estas psikologie ligitaj kun malnova sociordo, kiu ilin edukis kaj kiun ili priservis — pro la servoj ili estis privilegiitaj kaj distinge salajritaj. Idoj instinkte emas al tiu patrino, kiun ili suĉas. Kaj la instinkto kreas respondan psikologion. Ja estas konata fakto ke inteligentuloj malemis al Sovetoj kaj strikis kontraŭ ili. Ili instigis kaj pravigis militon kontraŭ meza Eŭropo, poste ili instigis okcidentan Eŭropon kontraŭ Sovetio. Kaj kiam malsukcesis forkuris eksterlanden. Multaj rusaj sciencistoj, verkistoj kaj artistoj ĝis nun vagas tra la mondo kaj siblas pri Sovetio. La esceptoj estis same maloftaj kiel blankaj korvoj. Nun inteligentuloj paciĝis kun Sovetoj kaj laboras kun ili konkorde. Oni ne devas ilin kondamni por ĉiam ĉar iliajn konduton kaj emojn gvidis *intereso*, kiu estas plej granda potenco de l' mondo kaj ekster ilia volo. Rusa kompartio ĝin bone komprenis kaj difinis sian rilaton al ĉi-tavolo de socio jam antaŭ Revolucio. Ĝi povis fiaski, se ĝi cedus al ĉi-tavolo en plej kriza momento de l' batalo. Interese estas noti, ke ĝuste ĉi-demando disigis bolŝevikojn kaj menjŝevikojn en Partikongreso de 1903 jaro. — Sciencistoj same estas inteligentuloj, kiuj servas al *estanto*. Sed interesoj de estanto kontraŭdiras al estonto (laŭ la bone konata formulo de Marks). Tial estontanoj neniam kaj neniel povas esti oficialuloj. Kolumbo, Marks, Lenin, Zamenhof kun oficialaj diplomoj estus vera absurdo! Tial nenion komprenis en Revolucio ti-kiuj penas konkordi ĝin kun malvarmigaj edifoj kaj admonoj de oficiala scienco. Ĉi konkordo por nia estonto estus same senrezulta kiel senfrukta koito de kastrito.

Vivo de lingvo estas ligita kun vivo de homsocio. Reformoj en lingvo paralelas kaj samvaloras kun reformoj en socio. Sed vi bone scias, ke oficiala scienco ekster kritiko neniam okupis sin nek pri socialismo, nek pri speciale interesa por ni lingvo internacia. Do nenion atendu de "instruituloj". Nia Satdemando kaj lingvoproblemo povas esti solvitaj nur „per niaj propraj manoj", kiel estas dirite en nia himno.

Maksim Krjukov.

For la partiecan fanatikecon!

En n-o 27 de "Sennaciulo" plendas administracio pri nesufiĉa plinombriĝo de membroj kaj abonantoj. Por forigi ĉi tiun malsanon necesas esplori la kaŭzon. Ĉu ĝi ne estas: La troa "unuflankeco" de Redakcio kaj kunlaborantoj, la skribmaniera tendenco ktp.

Ni estas proletoj, ĉie kaj ĉiam ekspluatataj. Nenia kapitalisto pagas salajron laŭ nia partianeco. Komunistoj, socialistoj, anarkistoj kaj kiel ĉiuj ceteraj sin nomas, *ĉiuj* estas sklavigataj. Senescepte.

Kial vi malamas vian kunulon? Kial ni malfaciligas la komunikadon inter ni? Nur pro la divers-speca partianeco. Estus bedaŭrinda fakto, se en SAT enradikiĝos tiaj malbonaj kondut-manieroj.

Malkaŝema konfeso: Mi mem estis unu el tiuj, al kiuj mi vokas. Sanĝiĝis mia spiritostato. La kolego suferas, toleras la saman ekspluatadon. Ĉu mi devas malestimi lin? Ĉar li ne apartenas al la sama partio kiel vi? Ne! Milfoje ne!! Li kaj mi volas interfratigi la proletaron tutmondan. Sekve vi ne semu malpacon en niaj vicoj! La socialistoj plendas pro insultado; la anarkistoj pro ignorado. Jam kelkiuj provas fondi novan laboristan esperantistan mondorganizon (T. L. E. S.). Ĉu alitendenculoj devas fari la samon? Kio rezultos el la disiĝo de fortoj? Nenio bona certe. — En SAT samkiel en sindikato trovu sin hejme ĉiuj esp-laboristoj. Ne nur regadu sennaciismo, ankaŭ neŭtralismo politika. Al ĉiuj SAT-anoj la samajn rajtojn. Troigo de diferencoj disigos nian organizon. Ni laboru kune por nia sankta celo: Faligo de la lingvaj baroj kaj liberigo de proletaro tutmonda.

Pankrac Friedmann, Nürnberg.

La alkoholkonsumo en Germanio altiĝas!

La monopoladministracio debitis dum julio 1924 10500, aŭgusto 22000, septembro 53000, oktobro 61000, novembro 86000 hektolitrojn da brando. Dum 5 monatoj la debito altiĝis okoble. Por ke la kvantegoj estu konsumotaj, la nombro de la restoracioj senĉese estas plialtigata. Pro la plialtigo de la brandproduktado la aliaj alkoholhavaj trinkaĵoj neniel suferas. Laŭ publikaĵoj de la statistika regno-oficejo estas impostitaj en la ambaŭ unuaj kvartaloj de pasinta jaro: 20131223, en la tria kvartalo 10263153 hektolitroj da biero. Ankaŭ la importo de vino grave altiĝas. En la jaro 1923 estas importitaj de Italio al Germanio 4122 hektolitroj; en la monatoj januaro ĝis aŭgusto 16754 hl da vino. Kiel oni vidas, la politika reakcio minacanta pli grave ol iam Germanion, havas fidelan helpanton kaj kunaganton en la alkohol-epidemio! *(Daab).*

Esperanto ĉe la junularo angla

Afero notinda, kiu devas atentigi la legantojn de "Senn." kaj ilin tre ĝojigi rilate al la estonto pro la promesplenaj rezultoj estas tio, kio okazis en Londono antaŭ nelonge.

Pro tiuj, kiuj ankoraŭ ne scias: troviĝas en Londono kaj preskaŭ ĉiu alia urbo tra la lando, dimanĉaj lernejoj socialistaj, en kiuj la geinfanoj de la laboristaro povas instruiĝi laŭ la principoj de socialismo. Kompreneble tiaj lernejoj ne plaĉas la kapitalistojn kaj de tempo al tempo tre fortaj estas la atakoj, kiuj direktiĝas al la de la posedantoj tre malŝatata instruado. Sed spite de ĉio, la lernejoj bone floradas, kaj se la novigaĵo, kiu ĵus enradikiĝis, nur influos la tutan movadon junularan, tiuj ĉi institucioj certe pravigos sian ekzistadon. Antaŭ du monatoj la estro kaj gelernantoj de iu dimanĉa lernejo socialista en la orienta kvartalo de Londono decidiĝis komenci la lernadon de Esperanto, kaj por pli facile tion efektivigi, petis konsilon kaj helpon de la Brita Ligo de Esperantistaj Socialistoj, multaj el kies membroj estas SAT-anoj. Sekve de tio la ĝenerala sekretario kaj aliaj blesanoj-satanoj vizitis la lernejon jam diritan, kaj montris al la gelernantoj tie kunvenintaj per interparolado, kantado, leteroj kaj ĵurnaloj, ke Esperanto vere estas forto viva, ligilo nekontraŭdirebla, kiu fine okazigos la interkomprenon inter la tutmonda proletaro.

Tre interesiĝis la ĉeestantaro, kaj kvankam ili ĵus komencis lerni la lingvon, jam ĉiuj ili inkluzive de la estro fiere portas la verdan stelon, kaj ĝoje anticipas la plezuron pri tio, ke postnelonge ili kapablos korespondadi kun junuloj alilandaj, kaj aniĝi al SAT. Ĉiujn alilandulojn-korespondontojn oni petas ke ili sendu siajn adresojn poŝtkarte — prefere ilustritajn — al k-do *Mills*, 32 Morland Road, *Londono E. 1.*

Por la de ili ricevotaj poŝtkartoj, la gejunuloj okazigos ekspozicion en la dimanĉa lernejo dum vespero.

Entute la lernantoj nombriĝas je 50 geinfanoj kaj gejunuloj. Sendube tio ĉi estas paŝo en la ĝusta direkto, kaj por ke la ideo disvastiĝu en aliaj similaj lernejoj, la supre-citita asocio klopodas kunvenigi kaj ekinteresigi baldaŭ la diversajn instruistojn tiucele, kaj plue aranĝi kursojn por ke ili mem lernu la lingvon.

Fine mi opinias ke la ideo estas niaflanke respondo al la alvoko de k-do Ziegler, kiu aperis antaŭ kelkaj monatoj en "Senn." rilate la starigon de insulo-grupoj por faciligi la instruadon de nia lingvo, kaj poste ebligi libertempojn ĉe la gejunularo alilande. Ĉiuokaze la sugesto estas bone peninda, kaj ĉi tie ni intencas fari nian eblon ĝin sukcesigi. *Ofiro.*

Historio pri forbalaitaj sinjoroj

(Ne legendo, sed tre leg-enda!)

Ne estas io pli ĉagreniga, ol tio, kiam etburĝaj elementoj enŝoviĝas en revolucian mondlingvan organizaĵon kaj tiel malhonorigas nin. Tio estas la nura motivo, kiu instigis min komuniki por ĉies scio (antaŭ ĉio, de l' gvidantoj de laborista ido-movado) subajn faktojn, bedaŭrinde, karakterizajn ne nur por la urbeto Lubni.

En Lubni (Ukrainio) ekzistas Esp. Societo; ĝi aranĝis en Fervojista klubo raporton pri esp-o. Post tio "alflugis" idistoj kun la celo organizi kunvenon. Eksciinte ke ili estas mondlingvanoj, la klubestro ekopiniis ke ili estas esp-istoj kaj volonte disponigis al ili plej bonan ĉambron de l' klubo: la Lenin-anguleton. Unu "komsomol"-ano (komunist-junular-ano) okaze alproksimiĝis al pordo kaj ekaŭdis malagrablan vorton, ne aŭdatan plu en Sovetio: "sinjoroj! sinjoroj! sinjoroj!" — La komsomol' ano alkuris al klubestro, tiu venigis la gardistinon kaj ŝi simple forpelis la "sinjorojn" el la klubo per . . . balailo. Post tiu sukceso alvenis iu Greĉko (komercisto, sin nomanta reprezentanto de laborista Rusa Mondolingual Uniono) kun la celo "klarigi" la aferon. Li longe parolis kun la esp. gvidanto k-do Liljer kaj finfine deklaris ke ĉiuj Lubni'aj "idistoj" estas knabaĉoj kaj ke li reesperantistiĝas (!!!). Ankaŭ li esprimis miron, ke k-do Logvin (SAT-ano, mortinta oktobre 1924) ial fariĝis idisto (!?!). K-do Liljer konsterniĝis. Tiam Greĉkvo montris n-ron de l' folieto "Nia standardo" (7—9, jul.-sept. 1924), kie sub pompa kaj grandioza:

"Esperantisti en Rusia adoptas Ido"

estis sciigite ke en "Lubni, gub. di Poltava. — La sekretario dil "Sovietlanda Esperantista Uniono" k-do Logvin transiris ad Ido ed adheris la Rusa Mondolingual Uniono" (!).

Por montri, kiom indigniga, absurda kaj mensogeca estis ĉi-komuniko, sufiĉas diri, ke somere 1924 k-do Logvin akre kontraŭbatalis la Lubni'ajn sinjorojn, korespondis pri ĉi-afero kun multegaj grupoj kaj organizaĵoj kaj intencis eldoni senblufigan broŝuron!!! Ni ne disputos, ĉu li pravis aŭ ne! Sed ĉu *akre kontraŭbatali* samsignifas je "adheri al Rusa Mondoling. Uniono"?! — Mi treege dubas!

Plue. El la "sinjoroj" preskaŭ neniu mastras idon. La ĉefan parton de sia tempo ili fordonas por sufiĉe stranga propagando t. e. mi deziras diri, ke la metodoj estas strangaj.

El la "ciklo" de l' metodoj mi indikos la ĉefan: forŝiri kaj forglui ĉie esp. afiŝojn kaj foliojn!

Ne malpli karakteriza estas ankaŭ ĉi-metodo: deglui esp. foliojn, surskribi ĉie sur la vorto "Esperanto" la vorton "Ido" kaj realglui la foliojn denove (videble, ne ekzistas ruslingva pri-ida materialo?!) — Ĉi metodo havas specialan valoron, ĉar ĝin uzas eĉ sufiĉe aŭtoritate . . . knabaĉo: "kamarado" Ŝaporenko (ĉef-delegito por Ukrainio de Kifintern? mi dezirus ne kredi tion!).

K-doj idistoj! K-doj gvidantoj! Forbalau ankaŭ la "sinjorojn", kiuj deziras vin fari la objekto de l' ĉies primokado!

Ili kovras per honto nin ĉiujn! Vin kaj nin samtempe!

Ili praktiku siajn faŝistajn metodojn kie ili deziras, sed ne en la vicoj laboristaj!

Forĵetu senkompate tiujn idiotojn, kiuj ne komprenas la gravecon de nia afero kaj per siaj malpuregaj rimedoj ridindigas la idismon kaj la mondlingvan movadon entute!

Ĉiuj primokas nun "Nia Standardo". Ĉu tio plaĉas al vi? Sendube ne! Forĵetu do la majstro-mensogistojn, kiuj emas fari el "Nia Standardo" publikigilon ekskluzive de blufaj komunikoj kaj senbazaj mensogoj, kiuj suferigos ne ilin, sed *vin mem!* *Dneprano.*

Nacilingvaj gazetoj (esp-istaj) estas petataj represi!

Baloto pri nova Direkta Komitato

2a listo de kandidatoj

Por la ordinara Direkta Komitato

9a sektoro: K-do Izgur E., Učiliščena 6. 5. *Kremenĉug.*
12a „ K-do Baĵenov V., Argunskaja 47. *Ĉita.*
27a „ K-do Dambe, *P. O. Erasmus,* (Transvaal).
33a „ K-do Corral Angel, St. General Hornos 910, *Buenos-Aires.*

Por la ekstra Direkta Komitato

9a sektoro: K-do Kolĉinski V., Sojuz Kommunalnikov. *Kremenĉug* (erare ni citis lin kiel ordinaran kandidaton en la antaŭa listo).
12a „ K-do Trofimov St., Bulvarnaja, uz. Nikolajevskoj, *Ĉita.*
33a „ K-do Barrot Antono, Congresso 5155. *Buenos-Aires.*

Ŝtata ekzameno por Esperanto en Wien

Por doni al instruo de esp. leĝan bazon kaj certigi pluan disvastigon, la instruministraro eldonis instruinstrukcion por la instruado de la mondhelplingvo esp. ĉe publikaj mezaj lernejoj kaj por la pruvo de scipovo de esp.

Solvoj de la problemoj en n-o 33

1) Lukul' satas — satas Lukul'. 2) Striko en industrio. 3) Oksikoko — Okcidento.

KRONIKO

Britio.

London. La ĉefa kunveno de BLES (11. apr.) montris kreskon de la organizaĵo. Entute 40 membroj. Nove entreprenita laboro estas la klopodo, enkonduki instruadon de esp. en "dimanĉaj lernejoj socialistaj". Ĉiusabate de 7—10,30 h. la anoj kunvenas ĉe 144 High Holborn, *London W. C.* Alilanduloj bonvenaj. Ni ricevis unuamajajn salutojn de k-doj el kelkaj landoj. Dum demonstracio en Hyde Park ĉeestis du esp-aj parolantoj. *Ofiro.*

Francio.

Paris. Post larĝa debato pri la projektoj de organizado, publikigitaj en S-lo, la ĉi-tieaj SAT-anoj *unuanime* interkonsentis pri la jenaj konsideroj:

1) En la franclingva teritorio la por-esperanta kaj per-esperanta laboroj funkcias glate, paralele helpante sin unu la alian. La anoj de F. E. O. estas ankaŭ SAT-anoj. Sekve la proponoj de k-doj Kolŝinski kaj 2921 havus ĉi-tie nenian efikon, tute ne ŝanĝus fakte la situacion.

2) Tamen, se la Parizaj k-doj konvinkiĝus, ke la proponita aliigo povus ŝanĝi la situacion en la teritorioj, kie estas granda diferenco inter la nombro de SAT-anoj kaj tiu de la anoj de naciaj organizaĵoj, ili ne kontraŭstarus la proponitan ŝanĝon. Ĉi-tie la afero estus ja tute negrava, ĉar fakte la ŝanĝo estus nur en la titolo. Tiam *Fédération Esp. Ouvrière* povus nomiĝi: *Propaganda Fako Franclingva.*

3) La Parizaj SAT-anoj restas firme ligitaj al la principo de sennacieca organizsistemo kaj sencede kontraŭbatalos ĉian provon je starigo de ia esperanta Internacio. Ili konsideras, ke la esp-istaj laboristoj, estante samlingvanoj, ne devas imitaĉi la organizsistemon de nesamlingvanoj. Kiuj celas starigi "Verdan Internacion", tiuj tre verŝajne estas senkonsciaj naciemuloj. For ĉian ajn naciismon, vivu sennaciismo! . . .

Komunikita de la sekretario H. G.

Germanio.

Schweidnitz. En nia urbo estas malfacile propagandi E. kaj SAT, ĉar la burĝa esp. grupo ekzistanta jam 15 jarojn, nur malmulte varbis inter la loĝantaro. Kaj nia urbo estas fortikaĵo de reakciuloj! Lab. Esp. Grupo (29 p.) kaj SAT-rondo (4 p.) propagandis tre vigle inter lab-istaro. Okazis prop. paroladoj ĉe div. lab. unuiĝoj; 1 kurso ĉe Gimnastuloj. Je 1. majo ni propagandis ĉiamaniere (kantado, flugfolioj, parolado). Ni forsendis 6 salutleterojn al eksterl. SAT-rondoj. — Por aranĝota ekspozicio ni petas k-dojn, alsendi materialon al adr.: k-do *B. Siegert*, Herrenstr. 22, Schweidnitz. *1851.*

Hungario.

Budapest. 26. aprilo de 9a matene ĝis 5a posttagmeze okazis XIa jarkunveno de H. E. S. L. Partoprenis 400 membroj. Ĥoruso malfermis. Delegitojn sendis Hungaria Socialdem. Partio, ĉiuj lab. kultursocietoj, kaj 13 diversaj lokoj estis reprezentitaj. — La societo kalkulas 1. 1. 25 — 836 membrojn (510 antaŭajare). Progreso de 46%, kiam la membronombro en aliaj lab. org-aĵoj falis je 20—40%! Dum pasinta jaro 5 novaj grupoj estas starigitaj, do estas sume 15 grupoj. Sed jam 6 novaj ĉi-jare estas fondotaj. (Konsiderinde, ke en Hungario oni nur povas fondi grupon, kie ekzistas almenaŭ 20 membroj). 60 senpagajn kursojn dum lasta jaro vizitis 1400 personoj. Senpage anoncis la kursojn gazeto "Nepszava" (soc. demokrata). Leterkurson partoprenis 20 p. el 10 lokoj. La societo havas lokon en "Eduka Fako" de Socialdem. Partio. Propagandvesperojn aranĝitajn dum 1924 partoprenis 3300 p. En 28 gazetoj aperis 70 artikoloj. Kashavaĵo: 80 milionoj h. kr., el kiuj 37,690 apartenas al pasintjare fondita librejo. La societo havas salajratan oficiston, propran klubejon, gazeton ktp. Pluajn informojn donas:

Centro de H.E.S.L., Budapest, IX, Márton u. 28.

Sovet-Unio.

Gomel. 27. jan. en G. oficiale legaliĝis gubfilio de SEU. De tiam esp. havas grandan triumfon kaj brilan sukcecon en ĉiuj sociaj sferoj. Nin jure legitimis Gubfako de Regna Ekzek. Komitato. Agitpropfako de Gub. Kom. de RKP sendis en nian Gubkomon sian delegiton, k-don Valejko. Gazetaro favore rilatas. Ni havas 150 anojn [1]. Funkcias tri grupoj, krome spec. grupo por pioniroj. Kiel kursejon ni havas polan lernejon. Estas venditaj pli ol 250 lerniloj. Konscia parto de proletaro tre atente kaj kun entuziasmo rilatas al lab. esp. movado. Ni nur povas labori en modestaj limoj pro manko de instruantoj. Nun ni organizos kursojn por perfektiĝo. Rajtigita de CK de SEU.

M. Polsemen.

Ivanovo-Voznesensk. Post organizo de kursoj ĉe lab. klubo "Iskra" estis lekcio 20. 3. pri esp. en Domo de Klerigado. Unu instruisto de germ. lingvo parolis kontraŭ artefarita lingvo, sed ricevis decan respondon. 25. 3. okazis lekcio "esp. k. proletaro" kun ekspozicieto en klubo "Ruĝa Laboristino" ĉe tekstilfabrikego "Rabkraj". Kursojn vizitas pli ol 70 gelernantoj. Ruĝaj ŝpinistinoj k. teksistinoj ekdeziras interrilati kun samlaborantoj de tuta mondo. Parolis k-doj Burkov kaj Lebedev. 17. 4. membro de komjunularo Rjabinkin faris rap. "Esp. kaj Junuloj" en lernejo je nomo de III. Internacio. Organiziĝis ĉelo. Lernas pli ol 50 gelernantoj. Unuamajan demonstradon partoprenis ĉi-lokaj esp-istoj kun propra standardo kaj kun signoj. *Esperkor.*

---

[1] Bedaŭrinde nur unu ĝis nun estas leganto de S. kaj nur unu estas SAT-membro!

Ĉefa problemo pri komunisma ekonomio

de *R. Louzon*

Antaŭ kelka tempo, la agentejo *Rosta* publikigis studaĵon pri la salajroj nuntempe aplikataj en U. R. S. S. Elreliefiĝis el tiu studaĵo, ke la salajroj konsiderinde diferenciĝas laŭ la metikorporacioj. Dum la meza salajro de tekslaboristo estas 83,9-kopeka, la meza salajro de tipografisto estas 139,3-kopeka. Inter tiuj du ekstremoj estas tuta grado da aliaj salajroj: 89 kop. por la minlaboristoj, 103 por la metallaboristo, 108 por ledlaboristo.

Nu, la fundamenta principo de l' komunismo estas agnoski la ekvivalentecon de la diversaj specoj de laboro. Komunisme, unu laborhoro valoras unu laborhoron, ĉu ĝi estas de inĝeniero aŭ de senmetiulo, de tipografisto aŭ de teksisto. La sola kondiĉo estas, ke tiu laborhoro koncernu laboron utilan.

Sekve, kiel klarigi, ke ĉe proletara Ekonomio povas ekzisti en la salajrado de la laboro diferencoj almenaŭ egalaj al tiuj ekzistantaj en la kapitalista socio?

Tiu demando starigas la tutan problemon pri la produktado en komunisma reĝimo.

Antaŭmilite, la socialismo (komprenante tiun vorton larĝsence) dividiĝis en du grandajn tendencojn, koncerne la manieron konsideri la funkciadon de tio, kion oni tiam nomis la "estonta socio".

La unua tendenco, kiun oni nomis "kolektivismo" kaj al kiu apartenis preskaŭ la tuta parlamentana socialistaro, konsideris la socialisman socion sub la formo de ia Ŝtato, kiu estus posedanto de ĉiuj produktiloj, kaj senpere kaj superrege ordigus la produktadon sur ĉiuj kampoj. En tia Ekonomio ne plu estas loko por interŝanĝado. Ĉiuj produktantoj estus nur salajruloj de la Ŝtato. Saint Simon kaj Louis Blanc povas esti konsiderataj kiel la patroj de tiu doktrino.

La alia tendenco estis tiu de la "komunistaj anarkistoj". Ĝi estis tiu de Proudhon, de Elisée Reclus, de Kropotkin. Laŭ ili, la komunisma socio devus konsisti el tuta aro da produktantaj grupoj, kiuj, ĉiu aparte, produktas libere kaj *interŝanĝus* libere la produktaĵojn de sia laboro.

Maldetale, oni povas diri, ke la unua koncepto starigas la komunisman socion laŭ la tipo de ŝtataj entreprenoj, la dua laŭ koopera tipo.

Tiuj du konceptoj tiel bone respondis unu kaj alia al profundaj veraĵoj, ke la rusa Revolucio estas alkondukita, dum apenaŭ kelkjara ekzistado, eksperimenti ambaŭ sinsekve.

La "milita komunismo" ne estis alio ol efektivigo de l' kolektivismo: La tuta rusa Ekonomio estis kunfandiĝinta en unu grandan unuon, direktitan de iu superega organo, la *Konsilantaro por Nacia Ekonomio.* La interŝanĝado plu ne ekzistis: ĉiu alportis la produktaĵon de sia laboro al la komunejo kaj ricevis de ĝi parton egalan, la "pajok".

La NEP (Nova Ekonomia Politiko) multe pli rilatas al la anarkista koncepto (Memkompreneble mi metas en la vorton NEP nur tion, kio estas al ĝi fundamenta, principa kaj forigas ĉion rilatan al la koncesioj faritaj al la kapitalismo en la celo ricevi de la fremda kapitalo la necesaĵojn bezonatajn por forigi la ruinaĵojn, okazigitajn de la fremda kaj civila militoj). La esenca karakterizaĵo de la NEP estas ja la reenkonduko de la interŝanĝado.

Ĉe la NEP, la diversaj entreprenoj naciigitaj estas starigitaj laŭ aŭtonomiaj grupiĝoj, nomataj "trustoj", kiuj havas sendependan vivon ekonomian: ili fabrikas per siaj propraj rimedoj, aĉetas kaj vendas, havas profiton aŭ malprofiton. Krome, ekzistas ankaŭ aliaj produktantoj: produktkooperaj societoj, opaj metiistoj aŭ terkulturistoj, kiuj produktas libere kaj interŝanĝas inter si aŭ kun la ŝtataj "trustoj" la produktaĵojn de sia laboro.

Sed tiam oni komprenas, ke en ĉiu entrepreno estante aŭtonomia, havante propran buĝeton kaj siajn proprajn enspezojn, povas esti la laboristoj tre diference salajrataj, laŭ tio se prosperas aŭ ne la entrepreno.

Kaj tio montras al ni la esencan mankon en la anarkisma koncepto. (Daŭrigota)

Leningrad. Dank' al morala subteno flanke de partiaj (kom.) rondoj esp. movado en Leningrad nun rapide kreskas.

Okazis *lekcioj* pri esp: antaŭ ĝenerala kunveno laborista en tipografio „Molodaja Gvardia" (Juna Gvardio), ĉeestis 80 laboristoj; en 50a Soveta Lernejo antaŭ 100 gelernantoj; en klubo je nomo de Komintern (ĉeestis 200 komsomolanoj); antaŭ ĝenerala kunveno de komsomolanoj ĉe klubo je nomo de Urickij (ĉeestis 50 personoj); antaŭ taĉmento de Junaj Pioniroj ĉe 57a infandomo (ĉeestis 100 gepioniroj), kaj en Domo de klerigado (klubo laborista) de Basilij-insula rajono (antaŭ 200 aŭskultantoj). Dum ĉiuj lekcioj estis aranĝita ekspozicio de esp. literaturo.

Kursoj komenciĝis en politklubo je nomo de Lenin (30 lernantoj) kaj en Elektro-Teknika Instituto (25 lern.)

Ĉe plua evoluo de la esp. movado en L. — la perspektivoj por tio estas bonegaj — aŭtune ekfunkcios esp. kursoj en dekoj da kluboj kaj lernejoj. Kalkulante je tio, Gub. Komitato de SEU malfermis *kursojn por instruistoj* estontaj: ĉiu el la 12 partoprenantoj devas fari provan lecionon antaŭ grupo da komencantoj (vico da tiaj provlecionoj formos plenan kurson). Post ĉiu leciono estas aranĝata kritiko, laŭ kiu estas ellaborata unueca modela metodo, laŭ kiu devos estonte instrui ĉiuj leningradaj esp.-instruistoj.

Sentiĝas ankaŭ granda manko je bonaj *lektoroj-propagandistoj.* Ankaŭ por preparo de tiaj Leningr. Gubkom. SEU malfermis kurson praktikan. Ĝin partoprenas 10 k-doj.

Al unua de majo Leningradaj esp-istoj kolektis mondonacon por Eldon-kooperativo de SAT, pliintensigis la varbadon al SAT kaj SEU. *H. Frank.*

DISKUTEJO

Helpu la progreson!

(Protesto kaj 6 tezoj)

Pri kelkaj lingvaj demandoj nia legantaro havas tre diferencan opinion. La Redakcio, dezirante esti lojala al ambaŭ tendencoj, ne intencas preni la partion por unu de ili. Sed ĝi nur deziras kontentigi la plimulton de la legantaro. Ĉu prave, ĉu malprave, – ni opinias, ke la granda plimulto malaprobas la proponitajn "simpligojn". Ni ne volas perdi abonantojn pro ĉagreniĝo pri lingvaj liberecoj. Necesas do atendi ĝis la venonta kongreso por ŝanĝi la sintenon. Presante la sekvantajn liniojn, ni nur montras, ke ni neniel volas malhelpi "progreson". Red

La Redakcio de "Sennaciulo" en unu el lastaj n-oj de nia asocia organo sciigis pri tio, ke ĝi plue ne allasos la uzadon sur la paĝoj de nia gazeto de diversaj formoj simpligitaj: ekz. bald*e*, morg*e*, anstat ktp.

La subskribintoj varmege protestas kontraŭ tio!

Ili pravigas la proteston per jenaj tezmotivoj:

1e Ĉu la uzado de novaj formoj kontraŭas la Fundamenton?

— Zamenhof mem detale pritušis la aferon. Li bonege komprenis ke lingvo internacia ĉiam devos evolui; lingvo estas organo, organo estas ĉiam evoluema. Li persone proponis manieron de l' alpreno de novaj vortformoj: por tio la novaj formoj estu uzitaj paralele kun la malnovaj. La uzad-procedo mem rezultigos ke la malpli taŭga el la konkurantaj formoj pereos. — Tiamaniere "io" iom post iom forpuŝas malpli taŭgan "uj" ktp. Tio alportas nuran utilon.

2e Ĉu la lasta SAT-kongreso en Bruxelles voĉdonis kontraŭ simpligitaj formoj?

— Ne! Male. Ĝi voĉdonis por la uzado en la eldonaĵoj de SAT de *simpla* lingvaĵo, facile komprenebla de ĉiu simpla laborista esp-isto.

3e Ĉu la novaj formoj estas malsimplaj? Ĉu malfacile kompreneblaj?

— Ne! Eĉ sesjara infano, komencinta la lernadon de nia lingvo, afirmos, ke ekzemple la simpla, belsona, pli facile elparolebla "e" havas avantaĝojn kontraŭ "aŭ", ke kvin- aŭ seplitera vorto estas pli facile lernebla kaj memorebla ol resp. naŭ- aŭ deklitera!

Ĉiu proleto, eklerninta Esp-on, neniam malaprobos la uzadon de "e" anstataŭ "aŭ". Li pro tio ja ĝuas pliajn facilecojn. Same li tial ne malaprobos aliajn, interalie, sufiĉe moderajn simpligojn. —

Neniu eblos afirmi, ke balde, morge, anstat, hiere, difero, konfero, komito ktp. ne estas pli simplaj, pli facile kompreneblaj (eĉ sen piednotoj!), pli taŭgaj kaj belsonaj ol resp. baldaŭ, morgaŭ, anstataŭ, hieraŭ, diferenco, konferenco, komitato . . .

4e Ĉu la novaj simplaj *formoj malhelpas la lernadon? — Ĉu ili malbone impresas la lernantojn?*

Ne kaj neniam! Ja demandu viajn lernantojn pri tio! — Ili respondos ke pli simplajn formojn ili certe preferas! Estas k-doj, kiuj volas trudi la malprogresemajn opiniojn iliajn ankaŭ al komencantoj kaj poste deklari ke la komencantoj mem malsimpatias *pli simplajn vortojn.*

Ja neniam komencanto mem preferos tion, kio estas pli maltaŭga kaj pli malfacile lernebla.

Nia lingvo estas facile lernebla, sed ne estas tiu facileco, kiun oni maleblu pligrandigi!

Ni denove rimarkigas, ke ni ĉi-tie parolas ne pri *tute novaj vortoj,* sed pri kelkaj simpligoj de l' malnovaj.

Preskaŭ ĉiuj kontraŭuloj de l' lingvo-simpligoj afirmas ke la lastaj venigas konfuzon kaj malkonfidon al la lingvo inter la lernantoj!

— Malprave kaj malvere! Tio dependas de l' instruantoj mem!

Ĉu la uzado de "io", de "proleto" anstataŭ "proletario" ktp. ŝanceligis la bonstaton de nia lingvo? Ĉu ĝi elvokis konfuzon? — Ne! Male! Ĝi pliriĉigis, plibeligis kaj pliraciigis la lingvon!

5e Kion fari por ke ekuzo de l' novaj formoj ne sekvigu malordon?

Ni "vivigu" la simpligitajn formojn, samkiel oni "vivigis" utilajn neologismojn, enkondukinte tiujn en la lernilojn de FEO, GLEA, "Esp-o Hejme", "Agitanto" kaj cet. t. e. ni menciu ilin en la eldonotaj lerniloj (laŭplaĉe eĉ ne menciante la malnovajn formojn!)

Tiam la lernantoj tuj sciiĝos pri la necesaj formoj, kiam ili lernos.

La lingvo-sciantoj konatiĝos kun la formoj el la eldonaĵoj "S-lo", SR, ktp.

6e Ĉu ni povas prokrastigi la simpligon de l' lingvo?

— Ne! Tiu periodo estas pli favora por tiu celo, kiam la lingvo estas malpli disvastigata, ol ĝi estos poste!

Krome, ni ne forgesu, ke la *pleja simpleco de Esp-o akcelos la disvastigadon kaj aplikadon de l' L. I.!*

* * *

Ni alvokas la Redakcion rezigni je la "malpermesa leĝo", ĉar tiu kontraŭas tute la spiriton de l' niakongresaj rezolucioj kaj eĉ de l' fama Fundamento.

Ni tuŝis ĉi-demandon (ĝi ŝajnas ne tro serioza por ti-kiuj ne komprenas ĝian gravecon) ĉar ni opiniis, ke la simpligo de l' L. I. estas ŝlosilo al pli rapida evoluo kaj ankoraŭ pli facila aplikado de l' lingvotrezoroj de l' L. I., ke ĝi estas la garantio de novaj venkoj ĉe la lingva "fronto" ĉar ĝi "obligos" por niaj proletoj la facilecon de l' lingvo-lernado. —

La proletaro bezonas plej simplajn ilojn! Nia lingvo estas pli simpla ol ĉiuj naciaj, sed simpliĝo, samkiel ĉiu evoluo, ne havas limojn; ĝi estas neniam finema. Do, nia lingvo estu simpla, denove simpla kaj ankoraŭ pli simpla por ke la Proletaro ĝin eblu ankoraŭ pli facile ellerni, ekmastri kaj alpreni!

E. Izgur (2332). I. Avrunin (1122).
V. Kolĉinski (1447). Frejdberg (4520).

Alia opinio pri sama temo

Organo de SAT laŭ mia opinio devus ŝanĝi tiun titolon: "Esperanto je la servo ktp . . .", ĉar ĝi grandpaŝe kaj rapide iras al Ido. Ĉu ne? Ĉu "Sennaciulo" ne rabadas la kompatindan Ido? Ĉu tiuj kompromisoj, kiel vortoj: anke, ankore, ante, balde ktp., tiuj sufiksoj kaj prefiksoj, kiel "atr, end, iz, oz, mis" estas Esperanto? Ne! — tio estas la floroj de Ido enigitaj en ujo de Esperanto. Ĉiunumere mi povas vidi sur paĝoj de S. la novajn kaj novajn florojn de Ido. Sekve S. uzas ne Esperanton, sed lingvon, kiun oni povas pli ĝuste nomi "Duon-Esperanto, Duon-Ido". Sed devo de redakcio de S. estas senkaŝe deklari sian programon rilate al internacia lingvo, kiun ĝi uzas, ĉar legantoj de S. konsternas kaj embarasiĝas: Unuvice S. mokas pri idistsistemo kaj ĝiaj adeptoj, — duavice tiu sama S-ulo formigas sian lingvon el elementoj de tiu sama Ido . . . . *Nik. Jefimoviĉ.*

SAT-konferenco por Rejnlando okazos en *Leichlingen* 25. majo. Ĉiuj k-doj de la koncerna teritorio bonvolu atenti ĉi noton.

KORESPONDEJO

1092. "La Faraono" bedaŭrinde ne plu estas havebla. *Adm.*

4611. Via traduko estas tre bone kaj zorgeme farita, tre korekta. Tamen la artikolo estas *tro* tendenceca por S. Ni ne povas riski la enpreson.

3380. Iuokaze ni uzos vian art. en S. *Red.*

Grave! Germanlingvanoj atentu! Grave!

Ĵus estas eldonitaj de SAT-anoj en Berlin la unuaj ekzempleroj de propaganda flugfolio por SAT kaj Esperanto en germana lingvo.
Por ĉiu varbanto kaj propagandanto ĉi-valora agitilo estas nepre necesa! Vidi specimenon aldonitan al "Sennaciulo".
Mendu grandamase! Por la movado!

Havebla *post antaŭa pago* ĉe k-do *H. Muravkin, Berlin-Grunewald,* Friedrichsruher Str. 30, II, Germ. *Poŝtĉeka konto*: E. Muravkin, Berlin, Nr. 148 098. Prezo inkl. afranko en germ. markoj:

10 ekz. por	Germanio — Aŭstrio	0,23 mk.	Aliaj landoj	0,25 mk.
25 „ „	„ „	0,60 „	„ „	0,65 „
50 „ „	„ „	1,10 „	„ „	1,25 „
100 „ „	„ „	2,20 „	„ „	2,40 „

La gajnota sumo estos bazo por plua SAT-Esperanto-propagando en Germanlingvio. Ĉe spec. informpetoj aldonu respondafrankon.

Presejo: UNS-PRODUKTIVGENOSSENSCHAFT, LEIPZIG